

Informilo de Novembro 2018

Numero 37, novembro 2018

“Intertrakto per parolaj kaj skribaj vortoj superas konfrontiĝon kaj perforton”: UEA adresas siajn membrojn kaj Unuiĝintajn Naciojn okaze UN-Tago, 24 oktobro 2018



Universala Esperanto-Asocio

En sia ĉi-jara mesaĝo okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj, 24 oktobro, Universala Esperanto-Asocio gratulis Unuiĝintajn Naciojn en ties 73-a jaro kaj alvokis al parolantoj de Esperanto subteni la laboron de la UN-familio. Ĝi aparte atentigis pri la longa historio de kunlaboro inter la Asocio kaj internaciaj organizaĵoj, precipe rilate internacian pacon kaj reciprokan interkompreniĝon:

“Universala Esperanto-Asocio, fondita en 1908, restrukturiĝis en la jaroj tuj post la Dua Mondmilito kaj la malvenko de la fortoj de faŝismo kaj genocido. Nia celo, same kiel tiuj de la tiam naskiĝanta organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, estis subteni lingvadon pli ol bombojn, kaj kompreniĝon pli ol antaŭjuĝadon. Ni daŭre kredas same kiel Unuiĝintaj Nacioj ke paca intertraktado per vortoj parolaj kaj skribaj superas konfrontiĝon kaj perforton, inkluzivo superas ekskluzivon, kaj diskutado kaj interkonsento estas esencaj por la daŭripovo de la planedo. Ni instigas niajn membrojn, ke ili sekvu la laboron de Unuiĝintaj Nacioj kaj aldonu sian subtenon al ĝiaj iniciatoj por paco kaj kompreno.”

La Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj markis la 70-an datrevenon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj instigas al NROj ekagi



En sia rolo kiel ano de la estraro de la Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj en Konsulta Statuso kun Unuiĝintaj Nacioj, UEA sponsoris rezolucion pri la 70-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, festota la 10-an de decembro. La rezolucio estis prezentita kaj aprobita en la lastatempa estrarkunveno de la Konferenco, en Novjorko.

Emfazante la gravecon de la Universala Deklaracio kaj la riskon aŭ forgesi ĝin aŭ supozi ĝin nezorginda, la rezolucio emfazis, ke la Deklaracio “estis formulita en la postsekvo de la Dua Mondmilito kaj la malvenko de la fortoj de faŝismo kaj genocido” kaj ke “la Universala Deklaracio naskis korpuson de internacia juro kaj internaciaj interkonsentoj kiu daŭre helpas konservi la pacon kaj permesi pacajn rilatojn inter la popoloj.” Sekve, temas pri “nemalhavebla elemento en la postmilita interkonsento bazita je la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, akceptita tri jarojn pli frue je fondiĝo de Unuiĝintaj Nacioj, kaj je akcepto de pluraj internaciaj instrumentoj kiuj celis establi regulare-bazitan internacian ordon radikiĝintan en internacia juro.”

“Konfliktoj en multaj partoj de la mondo kaj la samtempa neglekto de homaj rajtoj,” la rezolucio asertis, “produktas amasan kontraŭvolan homan translokadon kaj subfosas respekton al homaj rajtoj eĉ en landoj kie en pasinteco ili ĉiam pli kaj pli respektiĝis.” Sekve, “nun, pli ol antaŭe, en mondo en kiu la fortoj de tutmondigo unuflanke kaj kreskanta netoleremo aliflanke igas registarojn ignori fundamentajn rajtojn kaj liberecojn, tiuj fundamentaj rajtoj kaj liberecoj devas esti plifortigataj.”

La rezolucio alvokis al ĉiuj neregistaraj organizaĵoj, ke ili rekonu la 70-an datrevenon kaj igu ĝin okazo por reaserti la gravecon de la Universala Deklaracio en la nuntempa mondo.

La teksto de la Universala Deklaracio estas legebla en Esperanto ĉe <https://www.ohchr.org/EN/UDHR/Pages/Language.aspx?LangID=1115>

Protekto de lingvaj laborantoj: Esperantistoj emfazas ties gravecon

Kvankam parolantoj de Esperanto favoras akcepton de la Internacia Lingvo Esperanto kiel komunikilon trans lingvaj komunumoj, ili ankaŭ rekonas, ke ĉiuj klopodoj redukti lingvan miskomprenon alportas gajnojn al la internacia komunumo. Pro tio ili subtenas organizaĵojn kiel ekzemple Red T, koalicion de tradukistoj kaj interpretistoj kiu celas doni protekton al tiaj lingvaj laborantoj en militaj situacioj, kie multaj el ili ludas esencan rolon kaj kie, same kiel ĵurnalistoj, ili estas oftaj viktimoj de perforto.

Parolante dum la malfermo de dokumenta fotoekspozicio “Interpretistoj Misie: Kontribuantoj al Paco” en la sidejo de UN, Novjorko, la 26-an de septembro 2018, la reprezentanto de UEA ĉe UN, prof. Humphrey Tonkin, emfazis, ke lingvaj laborantoj en militaj situacioj, “celante simple antaŭenigi interkomprenon,” estas “ofte rigardataj minace, ĉu kiel malamikojn ĉu kiel homojn nesufiĉe solidare ligitajn al kiu ajn

idearo disŝiranta la koncernajn militantajn grupojn.”

“Senpense ignori lingvajn laborantojn en militaj situacioj,” asertis d-ro Tonkin “egalas endanĝerigi ilin. En lastaj jaroj ni, tute saĝe, komencas rekoni la riskojn al ĵurnalistoj en tiaj militaj situacioj: efika internacia dialogo antaŭsupozigas liberan kaj malferman gazetaron kaj bone informitan civitanaron. Sed se ĵurnalistoj estas en danĝero, same en danĝero estas lingvaj laborantoj, ĉe kiuj la risko de morto kaj vundiĝo estas konsterne alta.”

“Eĉ UN havas siajn blindecojn,” diris d-ro Tonkin, “kaj unu el ili estas la lingvoj. Lingvaj interŝanĝoj situas je la koro de la laboro de UN. Sed ni subtaksas la efikojn de lingvaj diferencoj, pozitivajn kaj negativajn, kaj ni malofte rekonas la gravecon de nejusta diskriminacio surbaze de lingvoj.”

D-ro Tonkin parolis je invito de la Konstanta Reprezentanto de Belarusio ĉe UN, Ambasadoro Valentin Rybakov, mem eksa profesia tradukisto. La Misio de Belarusio aŭspiciis la ekspozicion, kune kun la misioj de Azerbajĝano kaj Turkmenistano.

“Ni bonvenigas la ekspozicion,” d-ro Tonkin aldonis, “ĉar, paradokse, ĝi liveras la mesaĝon de la interpretistoj mem, parolante ne tra ili, sed por ili. Ni instigas al ĉiuj homoj, ke ili pli bone atentu lingvojn kaj iliaj efikojn, en ĉiuj sferoj, kaj serĉu solvojn kiuj rekonu diversecon, samtempe garantianta komunikadon.”

UEA reprezentiĝis en forumo de UNESKO pri migrado

Renée Triolle, reprezentanto de UEA ĉe UNESKO, estis inter la partoprenantoj de la Forumo de NROj en UNESKO “Alia Perspektivo pri Migrado” organizita en Tuniso la 26-an kaj 27-an de septembro. Entute 140 NROj partoprenis, el kvardeko da landoj. Aparta celo de la kunveno: forigi miskomprenojn pri migrado kaj evoluigi strategiojn por fronti tiujn miskomprenojn. Inter la strategioj estas: liveri pli bonajn perspektivojn ĉe hejme (kiam migrantoj forlasas siajn proprajn landojn, la rezulto estas neta perdo al tiuj landoj), kaj eduki la publikon pri la efektiva situacio de migrantoj (kontraste al la multaj misperceptoj, troigoj kaj ksenofobiaĵoj).

Ĉiuj tiuj klopodoj postulas lingvan komprenon. La lingvo restas granda barilo kiam oni celas prizorgi migrantojn, dungi ilin, starigi dialogon kun lokuloj, kaj integri ilin en la laborforton kaj la lernejojn.

Oni antaŭvidas, ke la demando reaperos en decembro kiam kunvenos la Ĝenerala Konferenco de UNESKO.

Medicina Esperanto-asocio aliĝis al HIFA



La Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA), organizaĵo aliĝinta al UEA, estis lastatempe agnoskita kiel membro-organizaĵo de HIFA (Healthcare Information for All: Sanprizorga Informado por Ĉiuj), tutmonda reto de sanprofesiuloj, eldonistoj, bibliotekistoj, teknologoj, esploristoj kaj politikfarantoj kiu laboras por universala kaj uzo-apoga aliro al laŭtema, fidinda informado pri saneco. Tia informado estas konsiderata esenca parto de atingo de la celo “Sano por Ĉiuj” de la Monda Organizaĵo pri Sano kaj de la Daŭripovaj Evoluigaj Celoj de UN.

UMEA estis fondita en 1908 por disvastigi uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto en medicino. La esenca celo de Esperanto estas superi lingvajn barojn. De sia fondiĝo ĝis hodiaŭ, UMEA aktivis tiucele, subtenante kunlaboron inter la internacia membraro de la asocio. Ĝi organizas medicinajn konferencojn, kunlaboras kun naciaj medicinaj asocioj kaj sanprizorgaj liverantoj eĉ en foraj regionoj de la mondo, kaj ĝi plenumas specifajn projektojn por superi lingvajn barojn en medicino. UMEA publikigas propran medicinan revuon jam de 1923, Medicina Internacia Revuo, MIR, kiu traktas diversajn temojn pri sanprizorgo kaj aperigas diverslingvajn artikolojn kun resumoj en la angla kaj Esperanto.

Personaro

Ni ĝojas bonvenigi Jon Liechty kiel kunordiganton de rilatoj kun UN kaj NROj en la Novjorka UN-oficejo de UEA, kaj Raul García kiel kunlaboranton kun la reprezentanto de la Asocio ĉe UN, Humphrey Tonkin.

La reprezentanto de la Asocio ĉe UN-Vieno, Prof. Hans Michael Maitzen, lastatempe anoncis, ke Alfred Heiligenbrunner aliĝos al la UN-delegacio de UEA en Vieno ekde 1 januaro 2019, kiel vica reprezentanto.

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041

www.esperantoporun.org

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041